

V-19119/12 (1955)

# OOMOTO

MONATA ORGANIZO DE OOMOTO

KAJ U.H.A.

1955 7-8

17-a Jaro N-ro (181-182) Administracio: Oomoto, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo

Abonprezo: ¥240 por unu jaro; \$0.80 aŭ 12 Steloj por eksterlando: Abonebla ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

## Fondo de Monda Konsilantaro por Inter-Religia Kunlaborado

Ĝuste antaŭ 30 jaroj, post enkonduko de Esp., Majstro O. Degučĉi, la fondinto kaj unua honorprezidanto de UHA, iniciatis la internacian kunligon de religioj de la mondo sub la organiza nomo, "Unuiĝo de Mondaj Religioj". Ĝi havis la Centron en Pekino (Ĉinujo) kaj la japanan centron en Kameoka. Ĝin partoprenis diversaj religioj — ĉefe el aziaj landoj. En tiu tempo okazis ankaŭ la manpremo de *Oomoto* kun la ĉina *Tao Juan*. Sed pro diversaj kaŭzoj, politikaj kaj aliaj, kiuj sinsekve okazis, ĝia funkciado estis devigata ĉesi. Tamen, alvenis la tempo maturiĝinta por ke ĉio providence estu rekomencita en tutmonda skalo. Dum la *Universala Konferenco de Religiistoj*, kiu okazis en Tokio, 1-4 de aŭg. (vidu p. 104), prez. Isao Degučĉi prezentis la proponon pri la fondo de internacia organizaĵo por la kunlaboro de l' mondaj religioj. Ĝin oni unuanime akceptis. Kaj la organizan taskon oni komisiis al la komitato, kiu konsistas el 8 japanoj kaj 6 alilandanoj, elektitaj el inter la gravaj reprezentantoj de diversaj religioj. S-ro I. Degučĉi ankaŭ estas unu el ili.

La komitato tuj ekfunkciis; la 13-an de aŭg. ĉe la Post-Kongresa Raporta Kunveno en Nikko, ĝi publikigis la decidaĵon kun la jenaj punktoj:

1. La aprobita internacia organizaĵo de religiistoj de la mondo estu nomata "Monda Konsilantaro por Inter-Religia Kunlaborado" (MKIRK);
2. La landa Komitato de MKIRK estu starigita en ĉiu lando, lokaj oficejoj estu instalitaj en diversaj lokoj de la mondo kaj la Internacia Ĝenerala Sekretario en Tokio;
3. La landoj, kiuj jam decidis fondi la Landajn Komitatojn estas: Japanujo, Hindujo, Indonezio, Vietnamo, Cejlono, Nepalo, Malajo kaj Usono. La komitato de nun en solidara kunlaboro elfaros la regularon kaj aliajn necesojn.

Per tio ĉi la nova interreligia organizaĵo ekprenis al si jam iom konkretan formon. La ideo de Majstro O. Degučĉi fine realiĝis dank' al la saĝo, entuziasmo kaj kunlaboro de ĉiuj ĉeestintaj konferenc-delegitoj. Ĉu ĝi sukcese iros aŭ ne, tio kompreneble dependas de la favora apogo kaj entuziasma vartado de ĉiuj mondaj religiuloj. La estontan aktivecon de la komitato kaj la organizaĵo ni informos en OOMOTO. Kunlaborontoj bonvolu skribi al la Komitato pere de nia oficejo. La Red.

## Japana Kulturo

### Artoj en Edo Epoko

Sango Uno

Hidejoŝi mortis en 1598, kiam Korea Milito ankoraŭ estis en la mezo. El ĉiuj daimioj, kiuj helpis lin, la plej potenca estis Iejasu Tokugaŭa (1542-1616).

Iejasu estis malgranda feŭdestro en Mikaŭa Provinco (la nuna Nagoja Prefektujo). Metita inter du potencaj feŭdestroj, Imagaŭa kaj Oda, li devis suferi pro multaj konfliktoj. Sed li pli kaj pli distingigis sin el inter multaj daimioj. Iejasu estis favorata per multe da

saĝaj kaj kapablaj vasaloj. Ambicia kiel Hidejoŝi, kaj avara li vivis ŝpareme kaj ekonomie: li ĉiam procedis kun firmaj kaj stabilaj paŝoj. Post la morto de Hidejoŝi li kaj liaj kunliganoj sukcesis frakasi la kontraŭajn armeojn ĉe la batalo de Sekigahara en 1600. Unuiginte la tutan landon sub sia regado li estis investita *sei-i-taiŝoogun* (generalisimo) en 1603 kaj fondis Ŝogunan Registaron en Edo<sup>①</sup> (la nuna Tokio). Tiele Tokugaŭa Bakufo<sup>②</sup> daŭris en Edo ĉ. 260 jarojn.

La prestiĝo kaj aŭtoritato de Tokugaŭa Bakufo estis multe pli grandaj ol tiuj de Kamakura kaj Aŝikaga Bakufoj. La Tokugaŭa reordigis plej rigidan kastismon. Escepte la imperiestron, korteganojn kaj la plej malaltajn plebanojn, oni dividis la ĝeneralan popolon de Edo Epoko en kvar klasojn — samurajoj, farmistoj, metiistoj kaj komercistoj. Libera intermiksiĝo inter la malsamaj klasanoj estis severe malpermesata. La militista klaso estis devigata adopti Konfucianismon kaj speciale respekti lojalecon kiel sian moralon. Kune kun la rigida interna kontrolo la registaro aŭdacis adopti eksterlandan politikon ekstravaganca t.e. la politikon de izoliteco. Tiel ĝi penadis por sia solida

stabiligo.

En feŭda socio estis nature ke sur la bedo de farmoj formiĝis la fonto de salajro por la reganta klaso—samurajoj. Tial la regantaro atentis por ke agrikultura produktado ĉiam estu pligrandigita. La eltrovo aŭ plibonigo de farminstrumentoj, plibonigo de akvo-radoj uzitaj por irigacio, la uzo de novaj sterkoj—ĉi tiuj ĉiuj altigis kaj grandigis, malrapide sed certe, agrikulturajn teknikojn kaj produktojn. Paralele kun tio diversaj industrioj pli kaj pli progresis, kvankam ili ankoraŭ estis en la stato de metioj. El tio rezultis ke la vivnivelo de la ĝenerala popolo relative altiĝis. Mona kapitalo iom post iom kolektiĝis en la manojn de urbanaro. En Tokugaŭa Epoko la urbanaro jam estis faktoro sufiĉe forte kreskinta por ludi gravan parton en ekonomia vivo kaj estis eĉ en pozicio por preni iniciaton en la agadkampo de kulturo.

La 1-a bildo montras pentraĵon, laŭdire verkitan de la fama urbana pentristo nomita Matabee, kiu vivis en la komenco de Edo Epoko. Ĝi prezentas "urbaninon" kiu laboras super teksilo. La teksado de ora brokato prezentita en ĝi rakontas ke ĉi-speca industrio jam prosperis inter la popolamaso. Ĉi tia "pentraĵo de belulino" baldaŭ evoluis en la pentraĵoj de *ukijo-e* aŭ ĝenro, kiu en la komenco reprezentis precipe belulinojn kaj *kabuki*-aktorojn. (*Ukijo-e* signifas pentraĵon, kiu

ilustras la vivon kaj la medion de la ĝenerala popolo.) La arto de *ukijo-e* estas skolo pli populariĝinta ol la pentrarto en Momojama Epoko, sed oni povas diri ke en la supra bildo ankoraŭ restas ia malnoveco. Tamen, la pentraĵo estas tre utila por studi la tiamajn morojn. Rigardu la desegnaĵon de la kimono kaj la formon de l' obio, kaj vi trovos la prototipon de la nuntempa japana kostumo.

Tiuj ĉi kostumo kaj virina figuro rememorigas al mi la dancon de la antikva aktorino nomita Okuni de Izumo Provinco (la nuna Ŝimane Prefektujo), de kies danco-dramo evoluis *kabuki* (vidu p. 117 de OOMOTO, 1954).

La vorto de *kabuki* havas en si verban sencon de *katabuki* (kliniĝi). Ĝi implicas la ideon de moviĝo, kline moviĝanta figuro t. e. danco, kaj ĝi fine kondukas al la simbolo de eleganteco kaj gracieco, kiujn la japanoj ŝatas pleje. Unuvorte la tuta arto prezentas sensimetrian belecon aŭ barokan stilon en Eŭropo, por tiel diri. Unu el la plej notindaj trajtoj de la *kabuki* estas ke, kiel sur la Elizabeta scenejo, neniu aktorino prenas parton kaj ĉiuj virinaj roloj estas luditaj de viraktoroj speciale edukitaj por tiu celo. En la meza periodo de la epoko aperis multaj famaj aktoroj, kiel ekz. Danjuuroo Iĉikaŭa (1660-1704) en Edo kaj Toojuuroo Sakata (—1709) en Kioto. La unua kreis dum sia aktora vivo tre belan





abstraktan tipon de *aragoto* aŭ “rolo de sovaĝulo”, unu el la plej karakterizaj ludartoj de la *kabuki*, dum la dua ludis dramojn de tiel nomata familia-hejma vivo verkitajn de Monzaemon Ĉikamacu (1653-1724) kaj Saikaku Ihara (1642-1693) tiel verve kaj realisme ke la viv-aktualeco tute ravis la rigardantaron.

En Genroku Erao (1688-1704) la urbana kulturo pleje floris en Edo kaj Osaka. Precipe la literaturaĵoj de Saikaku Ihara kaj Monzaemon Ĉikamacu ekhavis la valoron de monda nivelo. La aŭtoroj preferis preni temojn el la ĉiutagaj perlaboraj vivoj de la popolamaso, kiu suferis sub la jugo de feŭdismo. Saikaku komencis sian literaturistan vivon kiel *haikai*③ poeto. Estis dum la lastaj dek jaroj de lia vivo, kiam li verkis multajn novelojn, en kiuj

li priskribis diversajn aspektojn de la urbanara familio kaj socio. La noveloj, bazitaj sur akraj observoj, faritaj kun senkompatate kritikaj okuloj kaj skribitaj per facila kaj pikanta plumo, estas ofte komparataj kun tiuj de Maupassant. Famaj el liaj verkaĵoj estas: *Kooŝoku-Iĉidaiotoko* (Unua Amajisto), *Kooŝoku-Iĉidaionna* (Unua Amajistino), *Kooŝoku-Gonin'onna* (Kvin Amajistinoj) ktp. Ĉikamacu levis la nivelon de la marionet-spektaklo, kiu estis nenio alia ol nura amuzaĵo kun duba valoro, al la digno de dramarto per sia majstra dram-deklama *Jooruri*-teksto. En la dramverkoj li skizis realisme la internan vivon de homa naturo. Kvankam trograndige, sed por komparo, la japanoj nomas lin la Shakespeare de Japanujo. La plej populara estas la amrakonto “*Sonezaki Ŝinjuu*” (Duopa Sinmortigo ĉe Sonezaki). Dank’ al ĉi tiuj majstroverkistoj kune kun multaj distingitaj aktoroj la *kabuki*-teatraĵo venigis al si senprecedencan prosperon.

La 2-a bildo montras tipan ekzemplon de “rolo de sovaĝulo”. Ĝi, kiel jam menciite, estas unu el la gravaj karakterizaĵoj de la *kabuki*-ludo. *Aragoto* aŭ “rolo de sovaĝulo”, kiel la vorto sugestas, prezentis la ludon de furioza sovaĝa homo. Kun la tempo ĝi tamen evoluis kiel speciala forma reliefiga arto nemankebla en *kabuki*-ludo kaj fine de ĝi naskiĝis diversaj formitaj pozoj. La bildo montras la


pozon de *Danjuuroo*-tipo. Ĝi estas ekstreme abstraktita — ja super-realisme — ĝis tia grado ke nur la pozo rakontas sen rakonto, kiu estas apenaŭ sugestita. Kontraste tion la tipo de *Toojuuroo* estis realisma, kaj evoluis ĉefe en la dramo de hejma vivo.

La 3-a bildo montras *kabuki*-aktoron pentritan de Saraku Tooŝusai (1762-1835), kiu akiris senrivalan famon pro sia *ukijo-e* pri portretoj de aktoroj. *Kabuki*-teatroj kaj bordeloj fariĝis la plej amataj amuzejoj por la riĉa urbanaro. Do estas nature ke ĉi tie burĝonis la *ukijo-e*-skolo. En la fruaj tagoj *ukijo-e* estis unuopa verkaĵo, tio estas, sen kopioj. Poste



oni eltrovis rimedon represi kopiojn per ksilografio. Dank’ al ksilografiaj reproduktaj *ukijo-e* furore’ disvastiĝis kaj satigis la postulon de la popolamaso. La presado komence estis nur nigra, sed baldaŭ oni sukcesis ankaŭ kolorigi ĝin tre elegante.

Multaj gloraj *ukijo-e* pentristoj aperis sinsekve. Moronobu Hiŝikaŭa (? -1694) estis la plej grava persono en la starigo de tiu ĉi nova, populara skolo de la japana pentroarto. Utamaro Kitagaŭa (1743-1806) estis fama pro la pentraĵoj de belulinoj. Tre famaj inter *ukijo-e* artistoj pri pejzaĝo estis Hokusai



Kacuŝika (1760-1849), kiu verkis interalie *Fuji Sanjuurokkei* aŭ Tridek Ses Vidaĵoj de Monto Fuji, kaj Hiroŝige Andoo (1797-1858), kiu elfaris seriojn da pentraĵoj kiaj *Tookaidoo Gojuusan Cugi* aŭ Kvindek Tri Haltejoj sur la Tookaidoo kaj *Edo Meiso Hjakkei* aŭ Cent Vidindaĵoj en Edo. El ĉi tiuj majstro-pentristoj Ŝaraku estis precipe elstara, kvankam lia pentrista vivo estis mallonga.

La arto de *ukijo-e* komencis atingi Eŭropon kaj Amerikon en la mezo de la 19-a jarcento kaj estas bone konate, ke ĝi grave influis okcidentajn impresionistojn.

La 4-a bildo montras belulinon kiun Utamaro pentris. Oni povas diri ke ĝi estas la kulmina monumento de *ukijo-e*. Li intense strebis prezenti la dignon de homo, ne el sanktuloj

sed prefere el virinoj, publikulinoj kiuj vivis en sia ĉiutaga streĉita vivo. El tio rezultis ke la publikulinoj, kiujn li pentris, ja estas kvazaŭ puraj virgulinoj en la okulo de japanoj. Li nur celis en siaj verkoj realigi virinojn sen makulo en koro kaj korpo, kaj plene sukcesis en tio per siaj bildoj de vivecaj kaj ravaj virinoj. Estas kompreneble, ke la spiritostato kiu konsistigas la arton de *ukijo-e* estis la celo de subpremo fare de militista reganta klaso, kiu havis en si tute alispecan apartan kulturan spiriton, tiel ke sur la pentraĵoj kaŝe troviĝas nuancoj de ia deformita, tamen de-interne eksploda forto.

La 5-a bildo montras "Ruĝa Fuji", unu el la supre menciitaj "Tridek Ses Vidaĵoj de Fuji", kiun pentris Hokusai. Li vivis longe ĝis

la aĝo de 90 jaroj kun la ĉiam pli progresanta originala talento. La bildo estas farita en unu el liaj lastaj jaroj, la plej maturiĝinta periodo de lia pentrista vivo. Ĝi kaptis la momentan impreson de krepuska grizo super la vasta arbaro kiu kovras la monton ĉe la bazo. Oni povas vidi en ĝi tre akran guston de *haiko* (vidu p. 117 de OOMOTO, 1954).

Rimarkinda estas la fakto ke la urbana popolarto intense prosperiĝis, dum la ortodoksa arto de Kancoo skolo, protektita de riĉaj patronoj, *noo*-dramoj, konfucianismaj kaj aliaj etikoj subtenitaj de l' registaro ĉiuj perdis sian influon eĉ en sia propra reganta klaso.

Paliĝis ĉiuj "aŭtoritataj" aferoj altruditaj kaj en la ĝenerala popolo fermentis fekunda kulturo speciala por la urbanaro. Envere, multfojaj

malpermesoj kaj persekutoj de la registaro neniel sukcesis bremsi la artan manifestadon de vere nuda homeco de l' popolo, el kiu ekfloris ĉi tiuj belartoj. La popolarto tial disvastiĝis kiel distraĵoj, aŭ "saviloj" por la popolamaso, kiu baraktis en la malsuperaj tavoloj de la feŭda socio; konsekvence, estas neeviteble, ke al ilia amuzo ne mankas dekadencaj elementoj por malbridi al ili la naturajn homajn sentojn en serĉado de sensaciaĵoj.

Arto naskiĝas kiel en vivĝuo kaj ĝojo, tiel ankaŭ en malgajo kaj sufero. Belo kuŝas ankaŭ en kortuŝa malĝojo kaj eĉ en kuriozo. Ĉiuj artoj de tiu epoko, muziko kaj aliaj, ĉiuj havis en si melankolian tonon. Kiu ne povus kunsenti la elegian tonon ĉe la aprecado kaj kiu ne admirus? Trad. La Red.

① Antikva Edo estis vilaĝo plena je marĉoj. En 1457 Oota Dookan (1432-1486), militisto kaj beletristo kun rafinitaj gustoj, konstruigis fortikaĵon, kvankam en malgranda skalo, kiu poste fariĝis la grandioza Edo kastelo en kiu Iejasu instaligiĝis, post la disfalo de Hooĵoo-klano ĉe Odaŭara: Iejasu fariĝis la reganto de la tuta Kantoo Distrikto. De tiam Edo fariĝis la ĉefurbo de la lando.

② Militista registaro

③ Malnova poezia formo, de kiu venis la *haiko*-poemo

## Por nia Botanika Ĝardeno

Ni danke kvitanas jene:

47. S-ro Reelf Portner, Osijek, Jugoslavujo: semoj de 3-specaj floroj  
 48. S-ro Erkkä Tuomanen, Lappeenranta, Finnlando: semoj de 14-specaj floroj  
 49. S-ro Carlos Geiser, Curitiba, Brazilo: semoj de 4-specaj floroj kaj plantoj

## Anoncetoj

★ S-ro Gaston Tahon, 13, Oude Kerkstraat, Antwerpen, Belgio, deziras korespondi kun japanoj.

★ S-ro Avri Salamor, KIRYAT MOTZKIN, P.O.B. 8, (Izraelo), deziras PM-interanĝon kun seriozaj kolektantoj. Korespondas: Esp-e, Angle, Germane kaj France.

## Universala Konferenco de Religiistoj

Sub Unu Dio Religiistoj Ekstaris Por Solvo de Mondpaco

(1-4 Aŭg., 1955, Tokio)

### Solena Malfermo kaj Ĝenerala Kunveno


Antaŭ la destinita horo, la 10-a horo de la 1-a de aŭg., la konferencejo de Internacia Kultura Domo ĉe Azabu en Tokio, jam estis plene okupata de du centoj da japanaj kaj eksterlandaj delegitoj kaj observantoj el plej diversaj eklezioj de la mondo, kaj ankaŭ raportistoj el ĉ. tri dekoj da enlandaj ĵurnalejoj kaj radio- kaj televid-stacioj. La japanaj delegitoj reprezentis 120 diversajn religiajn sektojn kaj la alilandaj delegitoj estis sume 45 el 12 landoj: Anglujo, Cejlono, Formoso, Germanujo, Grekujo, Havajo, Hindujo, Indonezio, Koreujo, Malajo, Usono, kaj Vietnamo. Cetere ĉeestis 17 alilandaj gastoj kaj observantoj, inter kiuj sin trovis la ambasadoroj hinda kaj egipta, la reprezentantoj de la svisa, irana kaj vietnama ambasadorejoj, kaj la indonezia ĉefkonsulo. Okulfrape karakterizaj naciaj kostumoj de diverslandaj delegitoj estis belaj.

Per la horo de la himno "Sub la Sankta Lumo", kiun kantis Midorigaokahoranoj, okazis la solena inaŭguro de la historia evento, la Universala Konferenco de Religiistoj. Post muta Preĝo por Mondpaco salutis s-ro J. Simonaka, prezidanto de Organiza Komitato. En sia parolado li akcentante la gravan signifon de la Konferenco deziris ke la sinceraj klopodoj de ĉiuj ĉeestantoj nepre alportu al ĝi la brilan sukceson. Lin sekvis s-ro Ookubo, japana ŝtatministro, kiu legis la mesaĝon de la japana ĉefministro

*Hatojama*. La ĉefministro diris en ĝi: "Ja estas signifoplene ke ĝuste en la nuna kriza momento, religiistoj de la mondo havas la okazon kune kaj libere diskuti pri diversaj gravaj problemoj." Poste, la japana ministro de publika klerigado, la vietnama kaj hinda ambasadoroj sinsekve publikigis siajn mesaĝojn.

Post tio venis la vico de salutoj de alilandaj delegitoj: s-ro *Swami Satyananda*, fondinto de "Pura Vivo" en Malajo, s-ino *Ul Palchadhuri*, hinda parlamentano, s-ro *R. M. Kafrawi*, indonezia vicministro de religio kaj s-ro *Daalam-Sim*, hinda eksinspektoro de lernejoj, kiuj ĉiuj montris sian neordinaran entuziasmon por kunlaboro al la celo de la Konferenco. En la nomo de la japana ĉeestantaro faris la saluton s-ro *T. Sasaki*, ĉefdirektoro de Federacio de Japanaj Religioj. Pliprofunda emocio ekregis, kiam oni komencis legi mesaĝojn senditajn transmare de mondfamaj individuoj kaj religiaj asocioj el Anglujo, Francujo, Irako, Formose, Svislando, Italujo ktp., inter kiuj estis de prof. *Arnold Toynbee*, prof. *Kalidas Nag* (de Calcutta Univ.) k.a. Je la duono post la 11-a oni fermis la inaŭguran ceremonion denove per la horo de la himno. (2-hora ripozo post la tagmanĝo)

Je la 2-a p.t.m. la Ĝenerala Kunveno malfermiĝis sub la provizora prezido de s-ro J. Simonaka. Kontraŭ la fronta sidejo de la konferencaj estraranoj, la



Horo de la himno "Sub la Sankta Lumo" ĉe la solena inaŭguro de la Universala Konferenco de Religiistoj en Tokio

maldekstran flankon okupis la vietnamaj, usonaj kaj malajaj delegitoj, la dekstran flankon vice la formasaj, iranaj, indoneziaj, hindaj, angla, cejlona ktp., kaj ia ceteran flankon la japanaj delegitoj. Diverskoloraj aromaj floroj aranĝitaj sur la tabloj disdonis mildan, ĉarman freŝecon tra la ejo. Antaŭ ĉio okazis la mallonga sinprezentado de la transmaraj delegitoj. Poste oni rekonsideris pri la antaŭe preparita Konferenca Regularo, kiu post iom da demandoj nun adoptiĝis laŭ sia plena teksto. Laŭ la nova Regularo elektiĝis la prezidantaro: s-ro *M. Andoo*, japana parlamentano kaj eksministro de publika klerigado, s-ro *M. Ozaki*, prez. de Nacia Konsilantaro de Kristanoj en Japanujo, s-ro *K. Hirata*, ĝenerala sekretario de Ĵinĵa Honĉoo (Federacio de Ŝintoismaj Eklezioj), d-ro Swami Satyananda kaj s-ino Ul Palchadhuri, kaj aliaj 12 vicprezidantoj.

S-ro M. Andoo salutis en la nomo de prezidantaro. Unue li klarigas karak-

teron de la Konferenco ke ĝi signifas kunvenon por diskuti el la religia starpunkto urĝajn problemojn de la nuntempa mondo kaj *ne* religiajn problemojn kun apartaj doktrinoj kaj dikredo, kaj ĉe la fino akcentis: "Kiel mi, politikisto, partoprenis la kunvenon de religiistoj, tiel same plimulto de la mondpopolo sen ia dubo atendas de vi la klopodojn, dank' al kiu la mondo estos pli firme kunligita, kaj fine unuecigita sur la bazo de religia spirito. La hodiaŭa konferenco estu kaj estos epokfaranta momento en la homa historio."

Post la aprobo de la nomado de membroj de Sekretariato, de Organiza Komitato kaj de Komitato pri Rezolucioj, la unuataga kunveno fermiĝis je la 4-a. Oni kvazaŭ sufokiĝis pro la intensa varmego nespertita eĉ de la japanoj en la lastaj dek jaroj. En aparta ĉambro oni tamen havis la unuan kunvenon por Organiza Komitato.

## Laborkomisionoj

La 2-a tago (de la 9-a ĝis la 17-a horo) estis uzata por komisionaj laboroj, kiujn oni faris en apartaj ĉambroj de la sama Domo kaj kiuj konsistas el la jenaj tri:


I. Komisiono por akcelado de reciproka kompreno kaj kunhelpo inter ĉiuj religioj;

II. Komisiono por religio kaj paco;

III. Komisiono por rilatoj de religio al politiko, ekonomio kaj kulturo.

La 12 vicprezidantoj de la Konferenco, elektitaj en la antaŭa tago, prenis sur sin la rolon de prezidanteco de la respektivaj komisionoj. Ĉiuj komisionoj laboris super la temoj, donitaj al ili por diskuto.

En la I-a Komisiono partoprenis ĉ. 50 personoj, kiuj diskutadis pri la jenaj 4 temoj:



Nokta vido de la konferencejo, Internacia Kultura Domo ĉe Azabu, Tokio

1. Kiuj estas la komunaj elementoj en religioj, prezentita de s-ino *F. Miho* (kristano);

2. Konsideroj pri la esenco de religio, de s-ro *T. Mijake* (Konkookyo-ano) kaj de s-ro *G. Toofuku* (budaisto);

3. Respekto al la tradicio kaj aŭtonomio de ĉiu raso, de s-ro *K. Nakaniŝi* (ŝintoisto);

4. Kiel kunhelpi en la kampo de misio, de s-ro *G. Toofuku*.

Pri la 1-a kaj la 2-a temoj multaj delegitoj esprimis sin per diversaj opinioj, sed ili post ĉio aprobis la opinion, kiun eldiris s-ro *R. Velayudhen*, hinda budaisto, kiel jene: "Mondaj religiistoj reale ne havas sian universalan organizaĵon, per kiu ili kapablas kunagi facile; kion oni devas antaŭ ĉio konsideri."

Pri la 3-a temo oni akordiĝis kun la sekvanta opinio de prof. *T. Chakravarty* hindo: "La konscio de raso ĝis nun estis kaŭzo de multaj malfeliĉoj sur internacia tereno, pro tio ke la karakterizaĵoj de raso, ĉu religiaj aŭ kulturaj, estas tro alte taksitaj el propra egoista starpunkto. Sed, ĉe la sojlo de la nova epoko, ni, religiistoj, antaŭ ĉiuj aliaj devas ekstari sur la ampleksa vidpunkto de Unu Mondo aŭ Mondfederacio." Diskutado pri ĉiuj temoj pli kaj pli progresis kaj oni fine konkludis kaj ĵuris ke oni klopodu por starigi la eterne pacan mondon kunlabore, respektante reciprokajn tradiciojn kaj

aŭtonomion de ĉiu raso, kaj konsiderante ke ĉiuj malsamaj religioj estas de unu sama Dio.

En la II-a Komisiono oni pritraktis la jenajn temojn:

1. Kiel trakti militon el la religia starpunkto: (Demando de Absoluta Pacifismo)

a. Pri la pozicio de "pro-konscienca kontraŭstaremo", de s-ro *J. Brinkley*, (angla prof. de Riŝŝo Univ.);

b. Protesto kontraŭ la fakto ke milito ankoraŭ estas agnoskata de internaciaj leĝoj kiel libera rajto, de s-ro *H. Hamada*. (prez. de Instituto por Studo de Religiaj Problemoj);

c. Pri la moralordono de neniomortigo, de s-ro *N. Fujii* (budaisto);


d. Kiel agi kiel religiistoj kontraŭ la danĝero de A-bomboj, de s-ino *H. Nonomija* (kristano);

2. Kiel akcepti kiel religiistoj la "Kvin Principojn de Paca Kunekzistado", de s-ro *Ŝ. Mibu* (budaisto);

3. Kiel akcepti kiel religiistoj la ideon de Mondregistaro, de s-ro *Ŝ. Sakurai* (ano de Universala Homama Asocio);

4. Starigo de Mond-Paca Ĉarto, de s-ro *H. Oda* (ano de Ŝinri Jikkoo Kai).

Ĉeestis 33 japanoj kaj 11 eksterlandoj. Kiam pri la 1-a temo s-ro *Tran-van-Que*, vietnama budaisto, asertis la pravigeblon de "memdefenda milito" en certa okazo malgraŭ ke religiistoj principe devas kontraŭi militon, (la nunaj cirkonstancoj en Vietnamo certe influis lin grave), lin



Eĉ sudlandaj gastoj ŝvitegas.

refutis kelkaj delegitoj, kiuj ĉiuj akcentis ke milito estas milito, kaj en aktualaj cirkonstancoj estas ne-eble difini ĝin ĉu ĝi estas memdefenda aŭ ataka. Diskutoj iom deflankiĝis de la ĉeftemo kaj neniu konkludo venis dum la fiksita tempo.

Pri la d punkto de la 1-a, s-ro *David M. Earl*, usona Bahaano, legis la "Deklaron kontraŭ H-bomboj", kiun antaŭnelonge publikigis Bahaanoj en Usono, kaj asertis la fakton ke por nuligi H-bombojn la tuta Bahaanaro en Usono nun estas en firma solidareco. Tio impresis la ĉeestantaron kuraĝige.

La 2-a temo t.e. "Kvin Principoj de Paca Kunekzistado" elvokis ĉe la delegitaro plej varmegan debaton; aperis multaj opinioj por kaj kontraŭ ĝi kaj la diskutantoj ofte tro flamiĝis por obei la kvietigon de l' prezidanto. Ĝenerale dirite, multaj subtenis la Principojn, sed pli multaj aliaj ŝajnis ankoraŭ ne bone informitaj pri la afero mem.

Pri la 3-a temo, la proponinto mem asertis ke nur la establiĝo de Mondfederacio savos la homaron el la minaco de H-bomboj kaj ĝia ideologio devas esti bazita sur religia spirito. Kvankam la afero estis grava kaj interesa subjekto por internacia paco, tamen ankaŭ ĉi tie montriĝis, ke la mondfederacia movado estas ne sufiĉe konata pro kaŭzi viglan

diskuton.

La temoj de la **III-a komisiono** estis la jenaj:

1. Pri la rolo de religioj rilate al politikoj, ekonomio kaj kulturo por la starigo de mondpaco, de s-ro *Ŝ. Imaoka* (Liberalisma religiuulo);
2. Pri la sociala karaktero de religio, de s-ro *J. Hirose*, (UHA-ano);
3. Sendependa teniĝo de religioj kontraŭ politikoj, de s-ro *R. Nakajama* (budaisto);
4. Respekto al religio rilate al la apartiga principo de Ŝtato kaj Religio, de s-ro *S. Ono* (ŝintoisto);
5. Pri la ĝustigo de diversaj deflankiĝoj de l' moderna civilizaĉio, de s-ro *T. Tanaka* (ano de Seiĉoo-no-Ie);
6. Pri la vekigo de religia sento ĉe sciencistoj, de s-ro *T. Macuoka* (ano de Hiĉimen-rjudoo Kai);
7. Pri la religiista organiziĝo por



S-ro Ŝ. Sakurai, UHA-ano (staranta), klarigas sian proponon en la II-a komisiono.

politikaj celoj, de s-ro *Ŝ. Macuda* (ano de Seiĉoo-no-Ie).

El la supre menciitaj temoj, la 1-a, 2-a, 3-a kaj 7-a fariĝis kune la fokuso de diskutado. Rilate al la aktuala mondo religio havas en si du flankojn: rekt-rilatan kaj transcendan. El tio rezultis, ke la ĉeestantoj dividiĝis en du tendaroj: Unuj staris sur pozitivismo kun la firma konvinko ke religio estas la grava faktoro en la socia kulturo, dum la aliaj staris sur negativismo, kiu sin limigas al la savado de individuaj animoj. Bedaŭrinde la tempo mankis por elfari konkludon el tiuj kontraŭstarantaj opinioj, kiuj cetere temas pri la plej grava problemo de religio. Vere, la temoj estis tro gravaj kaj tro vaste ampleksaj por atendi kontentigajn rezultojn nur en unu tago, tamen almenaŭ estis certe ke iliaj sinceraj argumentoj efike servis al la formulado de rezolucioj, kiujn oni traktos en la sekvanta tago.

La 3-a tago estis same uzata por komisionaj laboroj, kiuj ĉi-foje disponas nur pri proponaĵoj "por rezolucioj." La rezolucioj, kiujn aprobis la respektivaj komisionoj, estis plus prikonsiderataj de la Komitato pri Rezolucioj ĝis la malfrua nokto. Ĉar oni povas legi ĉiujn rezoluciojn en aparta ĉapitro, ĉi tie estus sufiĉe nur citi la titolojn sen komentario.

La **I-a komisiono** traktis:

1. Pri la fondo de Universala Ligo de Religioj, de s-ro *I. Deguĉi* (prez. de Oomoto-religio);

2. Pri la okazigo de la sekvanta Universala Konferenco de Religioj, en aldono: Ekspedo de invitleteroj al diversaj religiaj organizoj de la mondo, skribe de s-ro *T. Makino* (el Usono);
3. Kvalifiko de Dimanĉo (almenaŭ duono de la tago) kiel la komuna ferio de ĉiuj religioj, de s-ro *K. Hirai* (kristano);
4. Starigo de Religiaj Centroj en diversaj landoj, de s-ro *R. Ŝimura* (budaisto);

La **II-a komisiono** traktis:

1. Pri la memorigo de "la 6-a de Aŭgusto" kiel la preĝ-tago por paco, komuna al ĉiuj religioj tra la mondo, de s-ro *R. Ŝimura*;
2. Pri la admono por paca solvado de internaciaj konfliktoj, de s-ro *K. Hidaka* (budaisto);
3. Pri la malarmado kaj abolo de A- kaj H-bomboj, de s-ro *K. Nakano* (ano de Niĉiren-sekto);
4. Pri la forigo de rasaj antaŭjuĝoj kaj distingtraktado, de s-ro *K. Kodaira* (kristano);
5. Pri la pacigo de lokaj militoj, de s-ro *K. Ŝibukaŭa* (ŝintoisto);
6. Sendo de delegitoj kun mesaĝo al la Monda Kongreso por Malpermeso de la Nukleaj Armiloj en Hiroŝima, de s-ro *Ŝ. Mibu* (budaisto);
7. Pri la forigo de mortpuno, de s-ro *C. Honjoo* (ano de Ŝinri Ĵikko Kai);
8. Pri aferoj speciale enmetindaj en la Deklaron de la Konferenco.

La **III-a komisiono** traktis:

1. Pri la alvoko por la establado de religia departemento en UNESKO, de s-ro *I. Ookuni* (ĝenerala sekr. de UHA);
2. Pri la alvokoj al la Unuiĝintaj Nacioj:
  - a. Pri la internacia solvmetodo de problemoj pri loĝantaro kaj naturprovizoj;
  - b. Pri la akcelado de membrigo de Ne-membroj-Ŝtatoj en UNO;
  - c. Pri la liberigo de popoloj en malpli-civilizitaj regionoj kaj pri la altiĝo de ilia vivnivelo, de s-ro *J. Simonaka*;
3. Pri la alvoko al ŝtatviroj kaj politikistoj de ĉiuj landoj por ke ili klopodu starigi la pacan mondon surbaze de religia spirito, de s-ro *E. Deguĉi* (Oomotano);
4. Pri la dissendo de delegitoj al politikaj potenculoj de Japanujo, Anglujo, Usono, Francujo, Sovetunio, Hindujo, Ĉinujo kaj UNO en la nomo de la Konferenco, de s-ro *M. Andoo*;
5. Pri aferoj speciale enmetindaj en la Deklaron de la Konferenco.

### Ĝenerala Kunveno kaj Ferma Ceremonio

Je la 9-a horo de la 4-a, la lasta tago de l' Konferenco, komenciĝis la Ĝenerala Kunveno per la raportaro el la I-a komisiono fare de prez. I. Deguĉi, de Oomoto-religio, en la granda halo, kie okazis la unuataga Konferenco. La rezolucioj finaranĝitaj de la komitato ĝenerale estis akceptataj sen longaj

debatoj. Sinsekvis raportadoj kaj adoptado de la rezolucioj el la II-a kaj III-a komisionoj. Intertempe urĝa propono por la akceptigo de Kvin Principoj de Paco Kunekzistado, fare de s-ro *Acharya*, hinda delegito, elvokis persistan kontraŭstaron de formosa delegito kaj aliaj kaj kaŭzis ne-malgrandan bruon tra la ejo, sed la prezidanto Swami Satyananda sukcesis reordigi tion per la unu-minuta medito de la tuta ĉeestantaro, kiu enblovis en la ejon tute refreŝigan atmosferon. Sed la propono ne akceptiĝis pro tio ke plimultaj subtenis opinionon ke ĝia decido estu rezervita kiel politika problemo.

Poste s-ro J. Ŝimonaka, reprezentante la Organizan Komitaton, laŭte legis la tekston de la Konferenca Deklaro, kiu senamende kaj unuanime akceptiĝis en la tondrega aplaŭdado de ĉiuj entuziasmiĝintaj ĉeestantoj.

### Deklaro

La nuna socio estas en la kirlmezo de nekalkuleblaj maltrankviloj kaj interbataloj. Ni, religiistoj, ne povas ne senti intense nian prirespondecon, kiam ni meditas la antaŭeniron de la nuna situacio de la mondo. Ni konstatas, ke en neniuj aliaj tempo antaŭe estis tiel granda bezono por bremsi la mispaŝojn de la materialisma civilizaĵo kaj direkti ilin al sendanĝera vojo, por ke la popolo de la mondo estu liberigita de maltrankvilo kaŭzata de politika koruptiĝo. La sola savrimedo por efektiviĝi la idealan mondon kuŝas en la kuraĝa praktiko de "religiaj instruoj".

Alie, la homaron atendas nenio alia ol tuteca ruiniĝo. La tuta

homaro devas rapide revekiĝi je la graveco starigi la eternan pacon sur la senmilita bazo de amo kaj toleremo.

Ni, religiistoj de la mondo, ignorante ĉiujn barilojn kaj diferencojn de nacieco kaj kredo, nun kolektiĝis ne nur por manpremi reciproke, sed por interŝanĝi opiniojn, kaj pliprofundigis nian amikecon kaj solidarecon, plifortigis la decidiĝon pri nia religiista komuna fundamenta devo por sindone labori por la bonfarto de la homaro. Kaj fine, ni faras la jenajn rezoluciojn (Vidu sube) por alvoki al la popolo de la mondo.

Milionoj da sekvantoj de diversaj religiaj kredoj estas ĉe nia flanko. Manon en mano, ni intencas kunlabori por starigi lumoplenan mondon, kaj solene deklaras ĉi tiun decidon al la tuta mondo.

Aŭgusto 4, 1955

Konferenco de Mondaj Religiistoj

La rezolucioj, menciitaj en la Deklaro, estis komisiitaj al la komisiono, kiu tuj post la Deklaro organiziĝis el 14 membroj de en- kaj eksterlandaj delegitoj, por dispono de aprobitaj projektoj.

Sub la prezido de s-ro Ŝimura, ĝenerala sekretario, oni eniris la Ferman Ceremonion. Saluti s-ro M. Andoo en la nomo de ĉiuj organizintoj. Hinda, indonezia kaj vietnama delegitoj, reprezentante la eksterjapanujajn delegitojn, esprimis siajn sincerajn dankojn pro la gastamo kaj la sukcesigo de la Kongreso. Sekvis la vigla kantado de la himno "Sub la Sankta Lumo". La Universala Konferenco de Religiistoj kun

multaj brilaj sukcesoj en Tokio, unuafoja okazaĵo ne nur en la japana sed eble en la monda historio, fine mallevis s'an kurtenon.

Vespere la de-transmaraj delegitoj ĉeestis la oficialan akcepton de la japana ministro de publika klerigado. Granda bedaŭro ke ĉi tie mankas la spaco por fari detalan publikigon de multaj gustumindaj vortoj, kiujn ĉeestintoj diris por saluto kaj debato.

La legantoj, tamen trovos en la sekvantaj Rezolucioj multajn pripensindajn sugestojn kaj faktojn, kiuj, ni esperu, anoncos la tagiĝon de la Nova Epoko.

### Rezolucioj

1. Kun arda deziro venigi la mondpacon kaj bonfarton de l' homaro, kaj sur la bazo de la firma religia konvinkiĝo ke oni devas ne uzi militforton kiel solvilon de internaciaj konfliktoj, ni urĝe admonas al la UNO kaj la registaroj de ĉiuj landoj de la mondo adopti la jenajn:
  - a. Malpermeso de la uzo de A-kaj H-bomboj kaj la reduktado kaj fina abolo de ĉiuj armiloj;
  - b. Solvo de ĉiuj internaciaj konfliktoj kun regiona karaktero, konforme al la libera volo de la popolo, kiu loĝas en la koncernata regiono;
2. Ni urĝigos la politikajn gvidantojn kaj influozajn sciencistojn kaj teknik-

istojn de ĉiuj landoj, ke ili faru la plejblon per sia valora kontribuado por la starigo de mondpacon, tiel ke ilia klopodo ĉiam estu laŭ la principo de religia spirito;

3. Ni decidis fondi internacian organizaĵon por inter-religia kunlaboro, (Mond-Konsilantaro por Inter-Religia Kunlaborado) kaj la Universala Konferenco de Religiistoj estonte okazos sinsekve en diversaj membro-landoj sub la aranĝo de tiu organizaĵo;
4. Ni deziras, ke religiaj grupoj aŭ organizaĵoj havu sian organon kun la celo studi la problemojn pri kapitalo kaj laboro, profunde rekonigi la ĝustan kaŭzon de la konfliktoj inter kapitalo kaj laboro, kaj kontribui por la solvo de la konfliktoj el la solidareca religia starpunkto;
5. Ni urĝigas UNO-n por:
  - a. Membrigi nemembro-ŝtatojn al UNO kiel eble plej frue kaj



Ĝenerala Kunveno de la 4-a kongres-tago



partoprenigi al ĝi reprezentantojn de la popoloj por fari la UNO-n efektiva "Monda Registro";

b. Solvi mondkalajn problemojn pri loĝantoj kaj naturprovizoj;

c. Eluzigi naturprovizojn en la malpli-civilizitaj regionoj por abundigi la vivnecesaĵojn kaj altigi la vivnivelon de la popolo, kiu loĝas en la koncernataj regionoj;

d. Fondi Religion Departementon en UNESKO;

6. Ni fiksas la 6-an tagon de Aŭgusto kiel la preĝ-tagon por paco ĉe ĉiuj religiistoj de la mondo;

7. Ni deziras ke interreligia komuna centro estos starigita en ĉiuj landoj de la mondo, kie religiistoj de diversaj sektoj povos libere kolektiĝi;

8. Ni klopodos ĉiamaniere forigi rasajn antaŭjuĝojn kaj disting-

traktadon;

9. Ni klopodos por la forigo de koloniismo imagebla en ĉiu senco de la vorto;

10. Ni klopodos por la absoluta elimino de homsklaveco kaj ĉiuj leĝaj malbonaĵoj el la mondo.

Por klarigi kaj disvastigi la signifon de la rezolucioj supre menciitaj, niaj reprezentantoj estos sendataj en la nomo de la Universala Konferenco de Religiistoj al la politikaj kaj aliaj ĉefgvidantoj de Anglujo, Usono, Francujo, Sovetunio, Hindujo, Popola Respubliko de Ĉinujo, Japanujo ktp., kaj ankaŭ Unuiĝintaj Nacioj.

(Rimarko de La Red.)

La 9-a kaj 10-a rezolucioj estis tiuj, kiujn s-ino *Ul Palchadhuri* kaj s-ro *Jagodish Sinha*, hinda delegito, respektive prezentis la 3-an tagon en la III-a komisiono.

## Kameoka kaj Ajabe Kunvenoj

### Realigo de l' 60-jara Antaŭdiraĵo

La 7-an de aŭgusto, matene, 17 alilandaj delegitoj kune kun kelkaj japanaj reprezentantoj el Tokio alvenis Kioton per ekspreso kaj atendis ĉe *Hotelo-Stacio* la baldaŭan alvenon de 10 aliaj alilandaj delegitoj, kiuj tuj post la finiĝo de la Tokia Kunveno rapidveturis okcidenten al Hiroŝima por ĉeesti la Mondan Kongreson por Malpermeso de Nukleaj Armiloj, okazigitan en la 6-a. (vidu p. 119) Kuniĝinte en la hotelo, ili

matenmanĝis. Gaje interparolante pri la Hiroŝima okazaĵo ili ĉiuj ekveturis al Kameoka per aŭtobuso. Survoje ili vizitis Kacura Imperiestran Vilaon kaj admiris la elegantecon kaj pitoreskon de la plej japanecaj arkitekturo kaj ĝardeno de la Vilao.

En la urbo **Kameoka** oni havis duoblan ĝojon en unu tago: la urbanoj aranĝis diversajn programojn por la 3-taga internacia manifestacio por paco

kaj ankaŭ de-ekstere kolektiĝis Oomotanoj el ĉiuj partoj de la lando por festi la naskiĝtagon de la jam forpasinta Majstro O. Deguĉi.

Solene okazis la Oomotana ceremonio por la dat-revea festo. Apenaŭ ĝi finiĝis, kelkmiloj da kredantoj intermiksataj kun urbanoj borderis la vojon ambaŭflanke — ekde la enirejo de la vasta Oomototeritorio ĝis la ĉefsanktejo

sur la monteto (kiu situas meze de teritorio) — ĉiuj flirtigante la flagetojn de Oomoto kaj Universala Homama Asocio. Sub la bonveniga arko de la flagetoj, sub la intensa varmo de la somera suno alvenas la gastoj. La 11-a horo. Varmo de l' suno ne ekzistas por ili, kiuj banas la varmon de bonvenigo. Tra ovaciaj ĝojkrioj kaj inter ondoj de flagetoj la gastoj, jam ebriaj de emocio, apenaŭ povis trairi ĝis la sanktejo sur la mont-



Varma akcepto al la gastoj en Oomoto-teritorio, Kameoka

eto, kie ilin atendas agrabla venteto kaj ripozejo. La Gvidantino de Oomoto, s-ino *Naohi Deguĉi*, gajvizaĝe akceptis ĉiujn gastojn, salutante unu post la alia. Sub la ombro de la granda ginko-arbo, ili ripozatis ĝuante la pitoreskan panoramon de la vasta kampara ebena etendiĝanta ĝis la horizonto. Tie ili prenis bongustan kaj belgustan tagmanĝon, kuiritan de membroj de Oomoto Virina Asocio.

Poste ili promenis en la Kamejama Botanika Ĝardeno kie troviĝas ankaŭ la kreskaĵoj senditaj de niaj legantoj el eksterlando, kaj al la Oomoto-Arto-Faka Ceramikejo, kie ili gaje okupiĝis en desegnado aŭ pentrado sur krudargilaj pladoj laŭ sia gusto — por fari al si la vojaĝmemoraĵon. Kelkaj el la gastoj devis ripozi en aparta gastejo. Ili ja estis tre lacigitaj de la longa vojaĝo, senripoza laborado kaj la nekutima varmego, kiu, cetere, tute eksterordinare kaj obstine superregis la landon jam de semajno. La ceteraj gastoj, kiuj estas pli fortikaj ol ili, partoprenis la publikan bonvenigan kunvenon, kiu okazis ĉe la gimnastikejo de Kameoka Liceo sub la komuna aranĝo de la urbo, UHA kaj Oomoto.

Intertempe la skribanto de tiu ĉi raporto interparolis en nia lingvo pri diversaj temoj kun s-ro *David M. Earl*,



Sino Naohi Deguĉi (maldekstra) kaj f-ino Mangalam, hinda delegito (meza)

usona Bahaano kaj unu sola esp-isto el la gastoj. Li estas invitita lektoro ĉe Jamaguĉi Universitato (en Jamaguĉi Prefektujo) kaj lekcias pri japana historio kaj la teorio de japana politiko. Jam de dudek kelkaj jaroj li estas leganto de nia gazeto OOMOTO.

Je la 13:30 la bonveniga kunveno (supre menciita) komenciĝis. Sinsekvis la salutoj de la urbestro kaj de I. Deguĉi de JHA kaj Oomoto. Resalutis kelkaj eksterlandaj delegitoj. Ĉiuj salutoj ege impresis la publikon pro la graveco de la afero, pri kiu ili temas; temas pri la komuna celo: mondpaco kaj bonfarto de l' homaro.

Je la 15-a, kunvenantaro laŭprograme transiris al la nova gastejo preparita ĉe la elementa lernejo, kie la urbestro bonvenigis kaj regalas la gastojn per frandaĵoj kaj bongustaj trinkaĵoj, kaj per prezentado de multaj amuzaj, kiel japanaj dancoj, japanaj muzikoj per al la gastoj kuriozaj instrumentoj k.a. Post la komenco de la Konferenco en Tokio la gastoj la unuan fojon ĝuis la amuzajn horojn ĝiskontente kaj dankis la afablan gastamon de la urbestro. Sed tamen ili ne povis ripozadi, ĉar per la vagonaro de 17:15 ili devis forveturi al Ajabe. El la

gastoj, kiuj jam ripozis pro lacego en la aparta gastejo de Oomoto-religio, ĉiuj ekstaris kaj kune forveturis, krom s-ino *Ul Palchauthuri*, f-ino *Mangalam*, hinda delegitino kaj s-ro *Swami Satyananda*, kiuj kredeble tro elspezis la energion karesante la kapon de la infanoj okaze de la survoja bonvenigo de la urbanaro. Ili noktiĝis ĉe Kameoka.

Ĉ. la horo de la sunsubiro la vagonaro alvenis al **Ajabe**. La gastoj tuj aŭtobuse veturis al la *Gunze Silkindustria Kompanio*, kie ilin oni atendas. Por ilin bonvenigi, la tutan distancon de 2 kilometroj sur la ĉefstrato svarme plenigis tridek miloj da gastamaj urbanoj! Kortuŝitaj de la neatendita ovaciego jam la gastoj estis pli ol feliĉaj kaj emociiĝis ĝis preskaŭa larmiĝo en siaj mir-brilantaj okuloj. Responde al la bonveniga saluto de la urbestro de Ajabe, ĉe la Silkindustria Kompanio, prof. *T. Chakravarty* esprimis la dankon nome de la gastoj, dirante: Ĉe Ajabe ni mem spertis la varmegan akklamadon, kian povas akcepti nur *Nehru* en nia lando! Tio ĉi ja estos neforgesebla en nia tuta vivo!”

Kiam la vespero venis ankoraŭ en la sufoka varmego ili kondukiĝis al la bordo de la rivero Jura, proksima de la Oomoto-centro en Ajabe. Ili ĉi tie ĝuis la pompan spektaklon de la kolorplenaj raketoj pafitaj por ili kaj de la por ili ekzotika “lanterna parado” sur la riverakvo. Ĉio ĉi tio estis nur por forviŝi al ili la vojaĝlacon kaj revigligi ilin por la morgaŭa kunveno, kiu estas pli grava. Post la ĝissata



Publika bonveniga kunveno en Kameoka

plezuro ili retiriĝis al siaj respektive destinataj hoteloj en la urbo. En la nokto jen venis la longe atendita pluvego! Ja mirinda favoro de Dio! Ĉiuj ekkriis unuanime. Trankvila dormo.

La 8-an de aŭgusto estis serene. Ĉio aspektis refreŝa dank' al la pluvego. La malvarmeta matena vento karesis la herbojn kaj arbojn en la Oomoto-teritorio. Ĉiuj parolis pri la postpluva agrablo. Antaŭ la granda preĝejo, Mirokuden, la hodiaŭa konferenĉejo, iras tien kaj reen la funkciuloj de la Ajabe Kunveno. Ankaŭ la subskribanto staris antaŭ la Mirokuden, kaj rememoris la kortuŝan vidaĵon, kiun hieraŭ disvolvis la tuta urbanaro de Ajabe por la bonvenigo de la de-transmaraj delegitoj. Tio ne estis la monro de gastamo el nura scivolemo, kia ofte okazas ĉe kamparanoj. Ne! La gastameco de la urbanoj havas la pravajn motivojn. Ili, kiel ĉiuj oomotanoj, vere atendis la alvenon de la hodiaŭa tago. Jam antaŭ 60 jaroj Fondintino *Naŭo Deguĉi* revelaciis ke baldaŭ venos la tempo kiam religiistoj de la mondo laŭ Dia volo kolektiĝos ĉe Ajabe kaj interkonsiliĝos por mondpaco. La Konferenco do estas tiom pli signifoplena por la Oomotanoj kaj urbanoj de Ajabe.

Iom antaŭ la 9:30 horo, en la granda halo de Mirokuden, oni anoncis la malfermon. Inkludis pastron *M. Ozaki*, kristana gvidanto, s-ron *B. Ŝio*, dekanon de Taiŝo Universitato, kaj multajn aliajn el Tokio kaj aliaj lokoj. Prof. *T. Ariga* de Kioto Univ. (kristano) kaj multaj aliaj venis el Kioto kaj aliaj pli-malpli proksimaj lokoj. Entute ĉ. 350 ĉestis. La delegitoj en la duon-cirkla formo, kaj tri cent observantoj ĉirkaŭis ilin. Salutis sinsekve s-roj I. Deguĉi, M. Ozaki, *Le Thien Phouc*, vietnama delegito, kaj *Kulandharma Ratna*, nepala delegito.



Ajabeanoj svarmas antaŭ la stacidomo por salutakcepti la gastojn.

Poste s-ino Naŭo Deguĉi kaj la urbestro de Ajabe legis sian mesaĝon respektive. Ilin sekvis la legado de la gratulvortoj senditaj de Hjoogo prefekto, la urbo Hiroŝima kaj aliaj.

Kiel la prezidantaro de la Kunveno elektigis: s-roj *Ho-van-Tu*, vietnama budaisto, T. Chakravarty, I. Deguĉi kaj *J. Takahara* ŝintoisto. Elektigis s-ino N. Deguĉi kaj s-ro M. Ozaki kiel honoraj prezidantoj. Nomiĝis la membroj de Sekretariaro kaj Plenuma Komitato. Prez. I. Deguĉi anoncis ke Ajabe Kunveno respektos la Konferencan Regularon en Tokio. S-ro *M. Ŝimura*, ĝenerala sekretario de la Universala Konferenco plie klarigis: “La signifo de Ajabe Kunveno sin trovas en la plideteligita debato pri la problemoj, pri kiuj diskutis kaj rezoluciiis la Konferenco en Tokio, kaj ankaŭ en la klopodado farota por

dissemi niajn ideojn. Kaj tial, la rezolucioj, akceptotaj de tiu ĉi Kunveno, estos registritaj en la oficiala protokolo de la Konferenco en Tokio." Sub la lerta prezido de s-ro T. Chakravarty oni konsideris unue pri la problemo "Pri la Retaksado pri Religio", proponita de s-ro E. Deguĉi (bofilo de Naohi D.). La kelkvorta resumo de lia projekto estis: "La demando, al kiu frontas ĉiuj religioj en la mezo de mondkrizo, estas, ĉu ili estas kapablaj solvi la aktualajn problemojn de internacia rilato. Religioj estas kritikataj jene: 1) Religioj estas senfortaj je solvo de socialaj problemoj; 2) Religioj ne havas la penetrantan juĝo-kapablon sampaŝan kun la monda kaj socia transiro; 3) Religioj estas tro enfermitaj kaj memkontentaj. Tial, ni kredas ke ni bezonas profunde studi la faktojn en la nuna socio, por kiu ni vivas. El la eltrovotaj faktoj ni devas




Amuzvesperaj raketoj por la gastoj sur la bordo de la rivero Jura

severe kritiki nin interne de niaj religiaj organizoj mem kaj el tio fari grandan konstruan kaj kontribuan penon per reformaj rimedoj." Diversaj subtenaj opinioj estis prezentataj, sed la proponaĵo mem ne estis rekta celo de tuja rezolucio. Ĝi estis la grava premiso por la sekvonta proponaĵo. Tial la prezidanto konsilis al ĉiuj pritrakti ĝin kune kun la dua temo posttagmeze. Je la konsento de ĉiuj oni eniris la tagmezan ripozon.

Je la 13-a horo rekomenciĝis la ĝenerala debato. S-ro Ŝ. Sakurai, reprezentanto de UHA, prezentis la duan projekton "Pri la Establigo de Mondordo surbaze de Religiaj Principoj" kun la klarigo jene resumita: "La konstruo de la nova mondordo estas ebla, nur kiam religia spirito fariĝos la ĉeftono en tekniko kaj kulturo kaj la homo edukiĝos sur la bazo universala. Homoj ne nur estas pensantaj raciuloj; ili ankaŭ devas profunde pripensi sian diecon kaj agnoski la fakton ke ili egale estas la infanoj de Dio, Fonto de la Universo. Enhavo de nova monda ordo surbazita sur religia ideo estas: 1) Starigo de unu grand-familia mond-sistemo, kiu ampleksos ĉiujn homrasojn; 2) Forigo de ĉiuj baroj dividantaj la homojn: klasa, socia, religia; 3) Establigo de potenca religia pac-organizaĵo supernacia; 4) Elmontro de la ĉefaj gvidprincipoj flanke de Universala Konferenco de Religiiistoj koncerne la problemojn ne nur spiritan-kaj etikan, sed ankaŭ politikan, ekonomian, sciencan, internacian; 5) Agordigo de la esencoj de religio kaj scienco por la bono de la spirita kaj materia vivo de la homaro. Ni kredas, se la nova ordo estos starigita sur la dirita ideo, la paco sekvos. Ni deziras, ke vi serioze pripensu ĉi tiun temon antaŭ ol fari ian rezolucion."

Sub la prezido de I. Deguĉi multaj



Ajabe Kunveno en la granda preĝejo Mirokuden

vigle prezentis siajn opiniojn pri tiu ĉi temo kaj ankaŭ la menciita unua temo. Post longa diskuto fariĝis la projekto de rezolucio, kiun s-ro I. Deguĉi prezentis al la ĉeestantaro. Ĉiuj unuanime akceptis la rezolucion, kiu tekstas:

### Rezolucio

La Ajabe Kunveno de Universala Konferenco de Religiiistoj decidis akcepti la jenon laŭ la principoj, kiujn oni deklaris en Tokia Konferenco.

1. Ni agnoskas la fratecon de homoj sendistinge de nacieco, raso kaj religio;
2. Religioj bezonas kunlabori manon en mano por sia komuna celo:

paco kaj bonfarto de homaro, respektante tamen la karakterizojn reciproke;

3. Religioj malaprobas militon kaj ĉian ajn perforton;
4. Religio kaj scienco estu paralelaj en sia klopodo por la progresigo de tekniko kaj kulturo de la homaro;
5. Religioj bezonas havi pozitivan influon sur ĉiujn sferojn de homa vivo: politiko, ekonomio, eduko, arto kaj aliaj, tiel ke sur tero estu kreitaj kulturo kaj civilizo en la ĝusta senco de la vortoj;
6. Religioj bezonas klopodi aboli ĉiujn obstaklojn videblajn aŭ

nevideblajn, kiuj malhelpas pacon inter nacioj, rasoj kaj religioj;

7. Ni realigos superrasan, supernacian religian organizaĵon laŭ unu mondfamilia sistemo, kaj laŭ la religia ideo de universala frateco.

Aŭgusto 8, 1955

Ajabe Kunveno de Konferenco de Mondaj Religiiistoj

Je la 15-a oni fermis la Kunvenon kun la ĵuro disporti ĉi tiun mesaĝon tra la mondo. Pro manko de tempo aliaj proponaĵoj ekz. pri la forigo de mortpuno, la frua liberigo de milit-krimuloj kaj militkaptitoj, la protekto de solecaj familioj de militviktimoj ne estis taktitaj, tamen ili registriĝis en la Konferenca

protokolo kiel la temoj por nia konstanta prizorgo. Post adiaŭa intervjuo kun s-ino N. Deguĉi, la eksterlandaj delegitoj kaj aliaj gastoj forveturis al Kioto per la 15:40 vagonaro. Jam senbezzone ĉi tie ripeti adiaŭan kriadon de la svarmanta popolamaso de Ajabe. Ĉi tiuj fervoruloj cetere staris laŭ la relvojo ĝis la eksterurbo, kaj la samo okazis ankaŭ ĉe Kameoka, kiun stacion ili preterpasis vagonare.

La lokaj kunvenoj okazis sinsekve en Osaka, Nara, Ise, Atami kaj Nikko tute laŭprograme. La Post-Kongresa Raporta Kunveno okazis en Nikko, la 14-an de aŭgusto, per kio ni metis la finan punkton al la Universala Konferenco de Religiiistoj. La kongreslingvoj estis la japana kaj angla. N. Esumi

## Popola Arto pri Pupoj

### (10) Talismano Bambueto de Ebisu Templo

Zen'ici Ŝuĉi

En Kioto kaj Osaka regionoj ankoraŭ restas malnova tradicio adori *Ebisu* kiel dion de komerco. La 10-a de januaro estas la festotago, kiun multaj komercistoj solenas, ripozante de sia laboro. En antikva tempo komizoj vizitis tiutage la lokan Ebisu-Templon, akompanataj de la mastro aŭ ĉefkomizo, kiu revenvoje kuĉimis regali ilin per bongustaĵoj ĝisate ĉe restoracio. Kun la forpaso de la tempo ĉi tiu moro fariĝis ekstermoda; nur malmultaj hodiaŭ ĝin konservas ankoraŭ. Tamen, la nombro de senkredaj feriantaj vizitantoj neniam malpliĝas: oni diras ke en unu festodaŭro ĉe la fama Imamija-Ebisu Templo en Osaka ja vizitas miliono da geviroj



kaj geknaboj.

En la festotago staras butikaj budoj en la templo-korto, kie oni vendas kiel talismanojn la bambuetojn kun figuraĵo de Ebisu-dio kaj aliaj sanktaj aldonajoj. La bambuetoj ĝenerale estas unu metron longaj. Oni alportas ilin sur la hejman altaron.

Legu kion diras A-bomb-viktimoj en Hiroŝima! p. 120

## Monda Kongreso por Malpermeso de Nukleaj Armiloj

6-8, aŭg., 1955, Hiroŝima

Okaze de la 10-jara datreveno de la eksplodo de A-bomboj sur Japanujn oni havis en Hiroŝima la Mondan Kongreson por Malpermeso de Nukleaj Armiloj dum 3 tagoj, la 6-a ĝis la 8-a de aŭgusto, kun la celo firmigi la solidarecon de popolamasoj kontraŭ A- kaj H-bomboj kaj pristudi la problemon "kiel nuligi la nukleajn armilojn for de la tero".

Antaŭ la Kongreso, okazis per religia rito la memoriga ceremonio pri la dek-jara datreveno de A-bombo-eksplodo ĉe la placo, kie staras la Atombomb-viktima Monumento. Partoprenis ĉ. 30,000 personoj el diversaj partoj de la lando kaj el eksterlando. La urbestro de Hiroŝima, la estraranoj de la Kongreso, reprezentantoj de atombomb-viktimoj, kiuj ĝisvivas hodiaŭ kaj aliaj sinsekve oferis la girlandojn sur la Monumenton, sur kiu ĉizitaj estas la vortoj: "Viaj spiritoj ripozu en paco; la sama eraro neniam estos ripetita." La momento de fatalo "15 minutoj post la 8-a horo", eterne neforgesebla — alvenis. Sub la resonado de sireno ĉiuj ĉeestantoj kaj ĉiuj enloĝantoj de Hiroŝima (360,000 loĝantaro) faris unu-minutan preĝon por la viktimoj, ĉiu ekstarante laŭ sia pozicio ĉe laborejo, ĉe hejmo kaj ĉe aliaj postenoj kaj lokoj.

La Kongreso komenciĝis je la 10-a horo ĉe Publika Halo. Ĉeestis ĉ. 2,000 japanaj delegitoj kaj ĉ. 30 ne-japanaj delegitoj el 10 landoj. La soleno daŭris ĝis la vespera krepuskiĝo laŭ la programo plena de multaj salutoj, mesaĝoj kaj raporto. El ĉiuj salutoj plej impresis

nin tiu de s-ino *Orsted*, sekretario de Usona Virina Asocio por Internacia Paco kaj Libero; ŝi simple sed kortuŝe esprimis sian pardonpeton al japanoj, agnoskinte unuflankan kulpon de Usono koncerne la uzon de A-bomboj super Hiroŝima kaj Nagasaki. La diverstemaj raporto de specialistaj ekspertoj pri internacia solidareco, pri la malhoma krueleco de nukleaj armiloj kaj pri la granda damaĝo farita de la A- kaj H-bomboj estas aro da tre valoraj dokumentoj. La vesperfesto por paco kaj "bonvenigo" al eksterlandaj gastoj okazis en la vasta placo jam menciita. En la programo ne mankis ankaŭ amuzajoj: kantoj, ĥoroj, dancoj, baletoj k.a.

En la dua tago de la Kongreso oni havis 6 fakajn laborkunsidojn. Ĉiujn kunsidojn partoprenis po ĉ. dek atombomb-viktimoj, el kiuj kelkaj reprezentante ĉiujn aliajn samsortanojn publike rakontis kia estis la homa katastrofo en Hiroŝima aŭ en Nagasaki, kaj ankaŭ pri la de ni neimageblaj suferoj kaj afliktoj, kiujn ili devis trasperti dum la pasintaj dek jaroj. Plejmultaj el ili estis virinoj. Kiu el ni aŭskultis sen malbeno al milito? El inter la aŭskultantaro aŭdiĝis tie kaj ĉi tie plorsingulto. Kelkajn vortojn aŭskultu ankaŭ niaj legantoj.

\*

Fino *Misa Jamaguĉi* el Nagasaki:

"En la unuaj kelkaj jaroj post mia viktimiĝo, mi baraktis duonmorte interne pro la sola demando, kiu min mordadis: ĉu min mortigu aŭ vivu, kaj memmortigo estis pli facila. Sed apenaŭ mi ekpensis



Malferma soleno de la Monda Kongreso por Malfermeso de Nukleaj Armitoj ĉe Publika Halo

kiu ja povos post mia morto pli bone diskonigi al la mondo la atombomban kruelecon, ol mi, la vivmodelo de viktimo, kun la postsignoj sur la korpo, mi decidiĝis plu vivi nepre vivi por la nova vivo spite ĉiujn malfacilaĵojn, kiujn mi re kontos dumvive.”

\*

S-ro *Itto Hiramoto*, direktoro de Asocio por A-bomb-viktimoj en Hiroŝima:

“La A-bombo falinta sur Hiroŝima en 1945 forrabis ambaŭ okulojn de mia edzino kaj la dekstran de mia sola filino. Nia tuta familio nun havas nur tri okulojn por tri membroj. Mi ofte sentas kvazaŭ vivi kun monstroj. La ĉiutaga realo estas tiom severa kaj griza por mi, ke ial ne estas tre ĝojige al mi trovi tonon de festeco en tiu ĉi Kongreso. Pardonu, sed bonvolu gustumi ankaŭ la krudan voĉon de ni, viktimoj, kiuj spertis kaj ankoraŭ spertos multajn suferojn.”

\*

F-ino *Tokie Uemacu* en Hiroŝima:

“Antaŭ du jaroj mia patro elĉerpe mortis pro leŭkocitemio kaŭzita de la A-bombo. Mia patrino, 64-jara, ankoraŭ kuŝas en lito atommalsane, ĉiam plendante pro doloro. Mi kaj unu el miaj fratinoj, militvidvino, apenaŭ vivtenas

la tutan familion per taglaboro. Malgraŭ la aserto de atom-sciencistoj ke la radioaktiveco de A-bombo ne difektas la heredsubstancon en homa organo, fakte du post-militaj infanoj de mia alia fratino ne estas normalaj; unu el ili mortis frutempe. Ankaŭ okazis, kiam mortis mia patro, ke la membroj de ABCC (Atomic Bomb Casualty Commission), venis al

ni kaj proponis, ke ili volonte pagos nian elspezon por la funebra ceremonio, se ni lasos ilin sekci la kadavron. Kia afablo, ke ili neniam vizitis nin dum mia patro ankoraŭ vivis en la lito! Kial mi povus forvendi la patron, eĉ se mi estas malriĉa!”

En la fakaj laborkunsidoj disvolviĝis seriozaj kaj entuziasmaj debatoj pri multaj proponitaj problemoj, el kiuj oni akceptis ankaŭ multajn gravajn rezoluciojn; tamen ilin ni devas ellasi pro manko de loko.

La trian tagon oni havis Ĝeneralan Kunvenon en Publika Halo. La antaŭa parto de la kunveno estis raporto kaj pritrakto de la rezolucioj, kiujn oni aranĝis en la laborkunsidoj. S-ro *Iku Jasui*, ĝenerala sekretario, resumante la akceptitajn rezoluciojn, raportis pri la rikoltoj. La posta parto estis dediĉata por la publikigo de la proklamo, alvoko kaj deklaro en la nomo de la Kongreso pri la antaŭenigo de la movado kontraŭ A- kaj H-bomboj laŭ pliampleksa tutmonda skalo. La publikigo de la Kongresa Deklaro estis la kulmina punkto de la Kongreso. El la Deklaro ni citas la jenajn vortojn:

“La reala mizera stato de la atombomb-postvivantoj estas ankoraŭ multe

kaj vaste diskonigenda tra la mondo. Kaj por protekti ilin ni devas urĝe disvolvi la grandan internacian movadon. Ĉi tio estu la bazo sur kiu la movado kontraŭ la nukleaj armiloj devas marŝi. Ĉiuj atombomb-postvivantoj konsoliĝos kaj saviĝos en la vera senco de l' vorto, nur kiam la nukleaj bomboj estos plene malpermesitaj.” Kaj finiĝas per la vortoj: “Nia movado ĵus hodiaŭ antaŭenmetis sian unuan paŝon. En la firma kunlaborado kun la mondpopolo ni koncentrigos nian forton kontraŭ la nukleaj bomboj ĝis la tago de venko, kiam ĉiuj nukleaj bomboj estos abolitaj, iliaj stokoj detruitaj kaj armeoj forliberigitaj al paca laboro. Ni ĉiam vidas antaŭ ni la estontecon de la brilanta mondopaco!”

La Kongreso fermiĝis per la ĥoro de l' soleno-melodia “L' Atombombon ne lasu plu ni”. Kantis la tuta ĉeestantaro.

Intertempe, kiel programero de la Universala Konferenco de Religiistoj, (pri kiu ni raportas en aliaj paĝoj) okazis la Porpaca Konferenco de Religiistoj ĉe

### Nova Sigelmarko



Formato en la faksimila klišo; prezo: 1 resp. kup. por 30 folioj. Mendebla ĉe Kansai Ligo de Esperantistaj Grupoj (Nakacu-hamadoori 2-20, Oojodo-ku, Osaka, Japanujo).

Memoriga Halo de St. Xavier en Hiroŝima la 5-an de aŭg. vespere. Ĉeestis 15 delegitoj de aziaj kaj eŭropaj religigrupoj kaj 200 delegitoj el japanaj diversaj religioj. Post ilia komuna kunveno ili publikigis “Hiroŝima-Deklaron” en la nomo de religiistoj.

Ankaŭ okazis aliloke la Ekspozicio de la materialoj pri A-bombaj damaĝoj de la 6-a ĝis la 9-a de aŭg.

La Red.

## Aŭroro

*al miaj japanaj geamikoj*

Vi estas la aŭroro de la Paco. Usonanoj, dungitaj de la Morto, vin torturis per superhoma forto; sed, se oni fifaris vin viktima, estas tre enviinda via sorto,

Hiroŝima, ĉar vi iĝis praviga fundamento kontraŭ pluaj atako kaj turmento. Fariĝinte proprajo de la mondo la atomo ne estos plue krima. Iĝas nun tro danĝera la respondo, kiu estus atome legitima. La hororo de tia hekatombo malfermigis dorlote la flugilojn de la paca kolombo, kiu ŝirmos estonte siajn filojn forpuŝante nukleajn mortigilojn. Ĉu iu ajn grimacos?...

La grimaco ne provokos militon. Ĉiu, tima, ne transsaltos la limojn de l' minaco. Vi lumigis l' aŭroron de la Paco, Hiroŝima!

*Saldanha Carreira*



## Literatura Rubriko

★ LA POLVO DE L' MORTO, kompilita el originalaj verkaĵoj en Esperanto de junaj samideanoj de Kansai kaj Tokai Esp-Ligoj. Eldonita de Japana Esperanta Librokooperativo. (Nakacu-hamadori 2-20, Ojodo-ku, Osaka, Japanujo) kiel unu el la programeroj de la Plenumkomitato de la Kontraŭ-Atombomba Rezolucio de la 41-a Kongreso de Japanaj Esp-istoj, 41 pj. en formato de 13 × 18.5 cm., Prezo — ¥ 70

Jam pasis pli ol unu jaro de kiam la sensacia raporto pri "la polvo de l' morto" (kaŭzita de la hidrogenbomba eksperimento) skuis la tutan mondon, sed en nia koro tiu viveca impresoj ankoraŭ restas tute sama kiel tiam, kaj la tutmonda voĉo kontraŭ atombombo pli kaj pli fortiĝas kaj grandiĝas. Ni, Esp-istoj, kiuj antaŭ ĉiuj aliaj, interesiĝas pri, kaj deziregas efektiviĝon de, mondopaco, longe deziras la aperon de la libro en Esperanto, kiu traktas pri tiu tragika evento: "La Polvo de l' Morto". Responde al nia deziro jen aperis la atendata libro sub la antaŭmenciita titolo. La tuta homaro jam bone konas la eventon, sed ĉiuj Esp-istoj tra la mondo, kiuj legos tiun libron, havas novan freŝan impreson pri la krueleco de hidrogenbombo. La libro priskribas ne per sensaciaj vortoj, sed oni povas plene kompreni la realan, korŝiran fakton malantaŭ tiuj vortoj. Ĝi celas prezenti la realan fakton objektivite.

Traleĝinte la libron, mi denove enpensiĝas pri la estonteco de la homaro; kune kun ĉiuj Esp-istoj en la mondo, ankaŭ kune kun la tuta homaro en la

mondo, ni volas plilaŭtigi kaj pliakrigi niajn voĉojn kontraŭ hidrogenbomboj kaj marŝi kun des pli da energio al la efektiviĝo de la paco de l' mondo.

Pri lingvaĵo mi bedaŭrinde devas konfesi ke la libro havas kelkajn preserarojn kaj neaprobeblajn esprimojn, pri kiuj mi tamen ne okupiĝos ĉi tie. Escepte de tio, ĝenerale estas bona stilo. Mi konsilas al la kompilinto, ke li pli energie korektu la manuskriptojn en la estonteco.

Z. Kacura

★ FAKTOJ PRI DANLANDO, unu el Internacia Serio de "Kio-Kiu-Kie", eld. de La Tagĵurnalo Politiken, Kopenhago — 1948. Formato: 12 × 17 cm; 64 paĝoj; prezo: neindikita.

Malgrandaj literoj, fotografiaĵoj, desegnaĵoj, ĉiuj estas tre klare presitaj. La libreto donas al ni koncizan super-rigardon pri Danlando. Popollernejoj, terkulturaj aferoj, la oficiala garantiilo de eksportvaroj t. n. "lurmarko" (luro, antikva dana blovinstrumento), famaj danoj, Thorvaldsen, Andersen, Kierkegaard, Brandes, k. a. ĉi tiuj ĉiuj monde konataj faktoj kaj nomoj estas bone prezentitaj. La stilo estas tre bona.

Z. Kacura

★ KANTO DE L' KORO, tradukita de Masao Mijamoto, malgranda biblioteko 5, eldonis Japana Esperanta Librokooperativo, formato 10.5 × 15 cm. prezo ¥ 80, 4 r. k.

Videble rimarkinda estas iom kurioza kontrasto, kiu sin trovas en ĉi tiu libreto, t.e. la poemaro el la rusa lingvo havas kompare glate belan ritmon kaj rimon, sed ilin ne havas tiuj el la japana. Pri tio ankaŭ la tradukinto mem preparolas jam en la postparolo de la libreto:

"Kiel traduki japanan poemon, kiu tute diferencas de la okcidenta, estas grava kaj malfacile solvebla problemo. Ili havas ritmon laŭnhavan sed ne forman, kaj tute malhavas rimon."

Nu, por pli facila komprenigo precipe al okcidentanoj mi aldonas kelkajn vortojn ĉi-rilate. En la japana poezio sin trovas du kategorioj: unu apartenas al poemo kaj alia al kanto. Poemo havas ritmon, por tiel diri, laŭnhavan, sed kanto ĝin ne ĉiam bezonas. Precipe multaj japanigitaj kantoj el okcidentaj lingvoj ŝajne povus esti nomataj "la frazmasoj" eĉ japanlingve. Estas do tute nature, ke la tradukinto nur amasigis la frazojn, ĉar la kanto japana ne meritas esti poemo, tial decas, ke oni neniam kritikemu la tradukinton simple pro manko de ritmo kaj rimo, sed nur indigeme kompatu pri la propra manko aŭ "difekto".

Jen, kaj ĝuste por tio estas la granda domaĝo, ke muziknotoj estas nenie troveblaj en ĉi tiu libreto.

### Popola Arto pri Pupoj

#### (11) Flugdrako de Ooji-Inari Templo

Zen'ichi Ŝuci


Japanaj popolartaj pupoj, kiuj simbolas aĵojn de religio, mito kaj legendo, ŝajnis rapide pereji precipe tuj post la milito, sed en la lastaj jaroj la amo al ili revigliĝis kaj la farado de tiaj pupoj denove prosperas. Inter ili flugdrako estas plej ŝatata de knaboj.

La flugdraka foiro ĉe la Ooji-Inari Templo en Tokio estas tre populara de antikva tempo. Ĝi okazas ĉiujare en la komenco de februaro kaj ĝin partoprenas multaj vendistoj en Kantoo Distrikto. En la festotago la templo donacas al ĉiu vizitanto paperan Jakko-flugilon kiel talismanon kontraŭ la danĝero de

Travidante la foliojn de la rusa parto, en kiuj troviĝas la jam famekonataj kantoj kiel "Ŝip-trenistoj sur Volgo," "Stenka Razin" kaj aliaj, mi monologe murmuris, ĉi tie mia oscediga kritikemo ne plu estas bezonata, eble ĉar ankaŭ mi estas la fidela kredanto de la stereotipa frazo: "Esperantistoj traduku ĉiam el sia gepatra lingvo."

En la japana parto "La Tombo-signo" altiras kortuŝe nian atenton pro tia unika materialo, kia koncentrigas senfinan humanecon. Estas vere, kvazaŭ la mute ensorbiĝanta pasio por paco de la tombosigno rekte movus la emociion de homa koro kvazaŭ radioaktivume. Jes, materialo mem estas bonega, sed la formo sekvas ne sufiĉe. Se ĝi havus ritmon kaj rimon, kian sensacian sonon ĝi kapablus disjeti! Mi neniam volas speciale aserti, sed tamen eble oni post ĉio alvenos al la senescepta konkludo: "Oni ne rajtas havi kuraĝon aserti, ke en la mondo ankaŭ ekzistas la esperanta poezio sen ritmo kaj rimo." V. F.

brulego Ĉar en Tokio jam de la malnova tempo spektaklaj brulegoj okazis tiel ofte ke la brulego fariĝis la Tokia karakterizaĵo. La formato de la apude montrita flugdrako estas 20 × 25 cm.



## El Notlibro Esperantista

*Teruo Mikami*

Ho, damoj k senioroj, oldulo  
 honoras pro superbo de l' enorm',  
 lin desapontas prodigo de l' degno  
 k kriĉas: "Resurekt' de l' IDO-form'!"  
 Responsan dupon serĉadas tardinto,  
 moroze paŭtas kun senapreca gap',  
 ĉar dum lin premis al lito koŝmaro,  
 kredencis ni nektaron en hanap'.  
 Jes, ni ne negas, ni rigas veselon,  
 ostentos voston de nia Pegaz'.  
 Post lanĉo, Junaj, al poŭpo koheru,  
 olduloj plongu k ek al Parnas'!  
 Ni ne gaskonas. La sun' de l' fortreso,  
 la "NETUŜEBLA LINGVA FUNDAMENT'",  
 descendos balde k estos kaputa  
 la rond' gemuta de l' notora gent'.  
 Futuron forcas ni. El la prizono  
 eskapis ni por pluki kun tenac';  
 la Poezia Fakvortaro servu  
 pri plena kripo kiel nur — prefac'.  
 Ni temerare agresas. Erudu!  
 Olduloj tramplu, knaku pro rankor'!  
 Konfrontas ni parcimonan paseon  
 k prosan nunon spite al rumor'.  
 Nin ne molestas ilia klamado;  
 softiĝos ĝi pro nia desapont'.  
 Kultivas lingvon k haŭlas veselon  
 la novaj *Leau, Couturat* k *Beafront*.  
 La prominentaj lucidaj ĝenioj  
 jam levas cenotafon por Vivant';  
 La kurtan moton ni konas de jaroj:  
 Hej, vivu IDO! Bas, bas, ESPERANT'!"

— Malfacila? Nekomprenbla? — Ne plendu, "Verson oni faras

el vortoj, ne el ideoj! ①"

La ŝajne "nekomprenebla" poemo estas de s-ro Julio Baghy; ĝin mi prenis el la artikolo, titolita "Danĝera Vojo<sup>②</sup>", kiun li publikigis en 1933, — nelonge post la apero de la *Parnasa Gvidlibro* (kun la *Poezia Fakvortaro* en ĝi). Li mem skribas samloke pri la poemo: La supra teksto komprenble estas troigo karikaturo, sed mi devas rimarki, ke ĉiun novan vorton mi prenis el la menciita "fakvortaro".

Ĉu vi havas la "fakvortaron"? Ne? Mi do komplezegos al vi klarigi ĉiun novan vorton laŭ la Fakvortaro. Jen laŭvice:

*damo*,\* sinjorino; *senioro*, sinjora moŝto; *olda*\*, maljuna; *superba*, impone, majeste bela; *enorma*, supermezure, eksternorme granda; *desaponti*, seniluziigi; *prodigi*\*, (tr) malavarege disdoni; *degni*, (ntr) bonvoli fari ion al malaltrangujoj afable, sed tamen sentigante sian moŝtecon; *kriĉi*\* (ntr), akcipitre krii; *resurekti*, reviviĝi; *responsi*\*, (ntr) respondeci pri; *dupo*, trompeblulo, mistifikeblulo; *tarda*\*, malfrua; *moroza*\*, malgajhumora; *paŭti*\*, (ntr) malbonhumorigi la vizaĝon, malkontente silentadi; *apreci*, (tr) kompetente taksi la artan valoron de io; *koŝmaro*, inkubsonĝo; *kredenci*, pormeti (trinkaĵon); *hanapo*, mezepoka kaliko; *negi*, (tr) nei, diri "ne"; *rigi*\*, (tr) provizi ŝipon per necesaj ŝnuroj, pulioj k veloj; *veselo*, malnova militŝipo; *ostenti*, parade elmeti, vante montradi; *lanĉi*\*, (tr) forlasi al ĝia elemento ŝipon aŭ balonon, provante ĝian funkciivecon; *poŭpo*\*, ŝipmalantaŭo; *koheri*, kunteniĝi, kunkroĉiĝi; *plonĝi*\*, (ntr) lerte sin ĵeti en akvon por naĝi; *gaskoni*, (ntr) diri vantajn blufajojn; *fortreso*\*, fortikaĵo; *descendi*\*, (tr) malsupreniri; *kaputa*, rompita, neuzbliginta; *gemuta*, estigante agrablan senton de hejmeco, senĝeneco, kamaradeco; *notora*, konata de plej multaj (ofte kun aĉa nuanco); *futuro*\*, estonteco; *forci*\*, (tr) truddevigi; *prizono*, malliberejo; *eskapi*\*, sinforsavi, sin tiri de

① La diraĵo de Mallarmé. Por ke oni ne miskomprenu la ĝustan signifon de la cititaj vortoj, mi enkadrigos la situacion citante la kuntekston: Al amiko, kiu iam plendis, ke li ne sukcesis elfari bonan soneton, malgraŭ la brilaj ideoj, kiuj svarmas en lia kapo, Mallarmé respondis: "Sed, mia kara, verson oni faras el vortoj, ne el ideoj!" — Prof. G. Waringhien, en Antaŭparolo de "Kvaropo".

② Aperis en *Lingva Kritiko* (Monata aldono al *Heroldo*) n-roj 14, 15, 16, 1933, kaj ankaŭ en *Oomoto Internacia*, n-roj 2-3, 4, 5, 6, 1933. Interesatoj, kiuj ankoraŭ legemos unu alian ekzemplon de la poezia "troigo karikasura" de J. Baghy, sin turnu al p. 14, *Literatura Mondo*, n-ro 1, 1933.

kaptiteco, ligiteco; *pluki\**, deŝire kolekti (florojn); *tenaca\**, elaste alten-iĝema, malfacile etendebila; *kribo*, manĝujo por bestoj; *prefaco*, antaŭparolo; *temerara*, blinde kuraĝa, troriskema; *agresi\**, (tr) iniciati militon; *erudi*, plej funde k detale instrui (iun); *trampli*, (ntr) terbati per piedo por eksalti aŭ pro kolero; *knaki*, (ntr) kraketi sub la dentoj; *rankoro*, obstina malpardono, venĝema resento; *konfronti\**, (tr) kompari, kontraŭmeti du atestojn aŭ akuzitojn; *parcimona*, troŝparema; *paseo\**, pasinteco; *rumoro*, konfuza voĉbruo de pluraj homoj; *molesti\**, (tr) daŭre ĝeni, malkomfortigi; *klami*, plurvoĉe krii; *softa*, mallaŭta; *kultivi\**, (tr) kulturi (propra-ence); *haŭli\**, (tr) tiri al si per ŝnurego ŝipon ktp.; *prominenta*, elstaranta; *lucida*, klarvida, posedanta la ĝustan uzon de sia racio; *ĝenio*, propra aparta spirito; *cenotafo\**, memoriga funebra monumento; *kurta\**, mallonga; *bas*, (ekkr)io malvivuo, malbis.

Ĉiuj vortoj markitaj per \* en la supra vortaro estas enkondukitaj en la *Suplemento* de Plena Vortaro; nur kelkaj el ili jam troviĝas en la sen-suplementa malnova eldono. La sola vorto, kies klarigon mi vane serĉis en la *Fakvortaro* kaj la *Suplemento* de P. V. estas *prosa* uzata en la verso naŭa de malsupre.

\*

Ankoraŭ iom da nervostreĉo kaj legu la jenon!

Inĝenia ogreto:

Povra kaj trista peticio estas la mia, kaj eble sterila; sed mi ne avanco en la basa kaj turpa vertiĝo korodi, devaluti kaj diskrediti la feblan ESPERANTON (jes, per majuskloj), prodigante pletore kaj orgojle la partikularan selekton leĝere farita, ne de obskura vagabonda reformatoro, sed de ĝirema direktivestro, kiu ascendis sen truko, spano post spano, lante kaj tarde, kaj nun bone dominas la lingvon; tamen, laŭŝajne kontaĝita de la piruetoj faritaj de kamuflita maskerado de pigraj uzurpatoroj de la vera profesio de literatoro, antaŭ ankoraŭ ne unu trimestro, eksponis kaj lanĉis skeĉon de eksplicitaj kaj hastaj esperanteskaj fivortoj.

Mi estas poltrona kaj timida, sed plenumas la duran devon molesti vian atenton per horora desfilo de nur kurta primico de tiaj *fajnaj* fiaskendaj vortaĉoj, neuzitaj en la paseo, kun reklamacia peto al masklaj esperantistoj por tuja prohibicio, ĉiu en sia demarkacio, sen rekviemo nek humidaj suspiroj tepidaj, ĝis decidos oportuna plebiscito.

Via olda filibustro, *Ernesto Guillem*

— Ve, ve-e, kia ĵargono! — Kara amiko, ne plendu, ĉar leteron oni verkas el vortoj, ne el veoj!

La supran tekston mi pruntis el la recenzo<sup>3</sup> de s-ro Luis Hernandez pri la 4-a eld. de Plena Vortaro. Li skribas en la recenzo: “Hodiaŭ, antaŭ ol fini, mi deziras ilustrati mian recenzon per kurioza letereto, kiun ĵus sendis al mi bona amiko kaj modesta samideano, kun humoro kaj pacienco por sprite verki sian skribaĵon, preskaŭ ekskluzive uzante radikojn el la *malolda* terminaro.” Kaj li prezentas la “letereton”, kiu tekstas kiel supre-montrite — sub la subtitolo: SUPLEMENTA NOVESPERANTO. Ĉar ĉi-foje mi ne komplezemos al la legantoj klarigi ĉiujn novajn radikojn, ili ekipu sin per la *Suplemento*, krajono kaj paperpeco — sufiĉe larĝ-formata — kaj mem diĉifru la tekston!

— Ĉu vi estas la obstina *Fundament*-isto, kiu repuŝas ĉiujn novajn vortojn? — Ne, ne-e-e! Mi uzos novajn vortojn kiom ajn, se necese, jes, se necese. — Kial do vi duoble-pli karikaturigas la aferon? — Ĉar en Esperantujo mankas verŝajne ankoraŭ vere pipraj-tiklaj “karikaturtoj.”

\*

En “Esperanto en Skotlando” (Aprilo, 1955), s-ro William Auld tre humortone kaj konvinke rekomendas la vorton “gaŭfo” (ludo), por distingi de “golfo”, kiel oni distingas ekz-e “firmaon” de “firmo”, “maaton” de “mato”, k. c. La vorton li prenis el *gowf*, prononcata “gaŭf”, tre populara “en Skotlando, la hejmo kaj centro de la ludo”. Mi ne scias, ĉu iu jam ellaboris liston de la radikoj kun tia duobla (aŭ triobla) signifo, sed mi povas prezenti ankoraŭ nur kelkajn: *vato*, *biskvito*, *daktilo*, *kabineto*, *ŝildo*, *plumo*, *rodo*, *sakro*, *ulno*... (Kp. *alto* — *aldo*).

<sup>3</sup> Vidu *Boletín*, okt, 1954 (Organo de la Federacion Esperantista Española).

MIA POŝTOKESTO S-ro D. M. B. al mi skribis: “Se ĉiu lando farus la samon kiel vi, t. e. Esp-igi naciajn vortojn, tiam, post nelonga tempo, ni ree havus “Babel”-on sur la tero.” (Temas pri mia Notlibro en n-ro 3-4.) Pruviĝis, ke miaj *eksperimentoj* plene sukcesis, ĉar ekzakte la samon kiel li, mi mem per tio volis diri! Al li, kaj ankaŭ al Prof. D. D., dankon pro senditaj esp-aĵoj. Al S-ro K. K. L. mi respondis pere de Red. (T. M.)



## Ho, Fatombombon ne lasu plu ni

Poez. Aŝada Ŝiji  
Trad. Mijamoto Masao  
Muz. Kinoŝita Kooji

Malrapide kun emocio



- 1) Ho, for-bru-lis jam ni-a hej-ma urb'. Kaj flo-ra-das nun blan-kaj flo-roj
- 2) Ho, ru-i-nas jam ni-a hej-ma mar'. Kaj fa-la-das nun ni-graj plu-voj
- 3) Ho, ob-tu-zas jam hej-ma la ĉi-el'. Kaj nun ko-vras lá ni-graj nu-boj
- 4) Ho, dan-ger' nin mi-na-cas sur la ter'. Jam pe-re-os la-bor' la-tuta;



sur ru-i-na ter', ki-e dor-mas cin-droj de l' pa-tro, pa-trin'. Ho,  
sur la ka-ra ŝip', ki-e re-gas tom-be si-len-ta mal-ĝoj'. Ho,  
su-per ni-a ter', ki-e gri-ze om-bras eĉ la sun-ra-di'. Ho,  
ri-ĉo kaj fe-liĉ', ki-on ni-aj fra-toj kon-stru-as sen-ĉes'. Ho,



l'a-tom-bom-bon ne la-su plu ni! Ne-ni-el la a-tom-bom-bon  
l'a-tom-bom-bon ne ta-su plu ni! Ne-ni-el la a-tom-bom-bon  
l'a-tom-bom-bon ne la-su plu ni! Ne-ni-el la a-tom-bom-bon  
l'a-tom-bom-bon ne la-su plu ni! Ne-ni-el la a-tom-bom-bon



la-su plu ni de-no-ve sur urb' de l' pa-tri!  
la-su plu ni de-no-ve sur mar' de l' pa-tri!  
la-su plu ni sur ka-ra ĉi-el' de l' pa-tri!  
la-su plu ni de-no-ve sur ter' de la mond'!

Noto de La Red: Poŝtkarto kun tiu ĉi kanto estas mendebla ĉe Japana  
Esp-Librokooperativo (vidu la adreson en p. 122), 1 resp. kup. por 5 folioj.

